



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 8
1964

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
30-a (37-a) jaro
Monata

Nordlanda Esperanto-kongreso en Oslo 1965

La nordlandaj esperanto-asocioj estas korespondintaj dum la printempo 1964 pri eventuala aranĝo de kongreso por siaj membroj. Fine ilie interkonsentis: Oni elektis la norvegan ĉefurbon Oslo kiel kongresejon, ĉar ĝi estas la natura centro geografia de la nordaj landoj.

Norvega Esperantista Ligo lasis al la loka esperanto-klubo *Klubo Esperantista en Oslo* aranĝi la kongreson.

La kluba estraro elektis jenan lokan Kongresan Komitaton (LKK): C. Støp-Bowitz, Kjell Gustavsen, Astrid Mansrud, Alfred Skyberg kaj John Berggreen, ĉiuj membroj de Klubo Esperantista en Oslo.

La kongresejo en Oslo estos la Universitato, kie troviĝos la kongresa oficejo, la salono por la granda komuna kunsido kaj la ĉambroj por la laborkunsidoj krom la aŭlo, kie okazos la solena festkunveno. La interkonatiĝa vespero kaj la ferma festo tamen aranĝiĝos aliloke en la urbo, verŝajne en Ingeniørenes Hus, ankaŭ situanta meze en la urbo.

Oni atendas proks. 250—300 partoprenantojn el la 5 nordaj landoj,

Danujo, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedujo.

Dum la kongresa tempo de sabato la 19-an de Junio ĝis mardo la 22-an de Junio okazos multaj gravaj aranĝoj, kiel naciaj jarkunvenoj, laborkunsidoj por faksekcioj, festkunveno, interkonatiĝa vespero, ferma festo, ekskursoj en la urbo kaj al la ĉirkaŭaĵo mondfama, kaj postekskursoj tra la plej belaj partoj de suda Norvegujo; cetere vidu la Provizoran Programon en ĉi tiu numero de *Norvega Esperantisto* (p. 92).

La plej grava aranĝo tamen estos la Komuna kunsido, kie oni diskutos la problemojn rilate al la temo *Nordlanda Kunlaboro*. Antaŭ la diskuto okazos mallongaj enkondukaj prelegoj pri kelkaj gravaj flankoj de la ĉeftemo, nome pri «Niaj organizaĵoj», «Ekonomiaj problemoj» kaj «Informa laboro».

La nova prezidanto de U.E.A., profesoro Ivo Lapenna, estos invitata al la kongreso kiel gasto kaj festpreleganto dum la oficiala kunveno en la universitata aŭlo.

(daŭr. p. 92)

POR NOVULOJ KAJ LERNEMULOJ

Red.: H. Fridén

El «Kanako el Kananam»:

(de Kenneth G. Linton, havebla ĉe Esperantoforlaget, boks 942, Oslo).

La Konstruantaro.

Tiuvespere mia komandanto donis al mi tute volonte sian konsenton por la konstruo de la dometo, do mi skribis la jenan leteron al Meriri:

«Tunait mi bin tokim long bikbos bolong mi. Em i tokim jes kwiktaim. Kalabusboi i ken gerap wokim haus long Wandei monitaim. Nau mi selim toktok tenkuy tumas. Nambawan pren bolong yu i tok».

Sufiĉe libera traduko de ĉi tiu letero estas: «Hodiaŭ nokte mi parolis kun mia komandanto. Li tuj konsentis. La malliberuloj povos komenci la konstruon lundon matene. Mi tre dankas al vi. Via amiko».

Glosoj:

Gerap wokim — komenci labori (get up workin')

Wandei — Monday (lundo)

Monitaim — morning time (matene)

tumas — too much (tro multe)

Nambawan pren — Number one friend. (Plej bona amiko)

bolong mi — mia

La sekvintan matenon mi donis la leteron al Kopos, kiu metante ĝin en sian kartoĉpoŝon, ridetis sian tutan komprenon. «Ĉu la estro jesis?» li demandis.

«Bone, Mastro», li respondis, kiam mi certigis lin pri la konsento de la komandanto. «Meriri diras, ke vi bonvolu forigi la tendon. Lundon la laboristoj iros en la ĝangalon por faligi arbojn. Lundon tagmeze Meriri atendos la veturilon ĉe Bilio».

Mi promesis sendi la veturilon ĝustatempe.

Ni forigis nian tendon sabaton post-tagmeze, post kiam ĉiu el ni trovis provizoran loĝon aliloke. Karolo loĝigis min en la proksiman tendon kun li, Vik ekloĝis kun Fred, la veturigisto, kaj Bil translokiĝis en la malantaŭan tendon ĉe Rob, la flegisto, kiu baldaŭ poste devis kuraci min. Okazis ĉi tiel.

Klopodante malstreĉi iun el la tendosnuroj, mi hazarde metis la manon sub la randon de la tendokovrilo ĝuste sur vespan neston. Proksimume kvardek vespidoj, rigardantaj la mondon la unuan fojon, kaj sin pretigantaj por la unua flugo, montris sian koleron kontraŭ mia altrudo per pluraj pikoĵoj sur miaj fingroj. Rob baldaŭ ĉesigis la doloron per iom da amoniaka solvaĵo.

Klarigo:

konstruo — byggingen
sekvintan matenon — eg. morgenen som fulgte

kartoĉo — «kardesker», patron

konsenti — være enig

Meriri diras: «Bonvolu forigi la tendon». Indirekte tale altsâ: M. diras ke vi bonvolu...

fal-ig-i — bringe til å falle, felle

vetur-il-o — kjøretøy

ali-loke — på annet sted

loĝ-ig-i — innlosjere

proksiman tendon kun li — pli ĝuste: kun si.

ek-loĝi — her: flyttet inn til.

vetur-ig-isto — kjørekaren

trans-lok-igi — flytte over

fleg-isto — sykepleieren

kuraci — kurere, gjøre frisk

ĉi tiel — «som følger». (Det skjedde således)

mal-streĉi — slakke

hazarde — tilfeldigvis

vespo — veps

sin pret-igi — gjøre seg rede til

altrudo — inntrengen

ĉes-igi, igi ĉesi — bringe til opphør

solv-aĵo — oppløsning

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—

1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—

1/8 p. kr. 19,—.

Aŭtuno kaj literaturo

En Norvegujo la aŭtuno estas la literatura sezono pli ol iu alia. La plej multaj libroj aperas aŭtune. La sezono estas favora, ĉar la vesperoj estos longaj kaj mallumaj, kaj bone taŭgas por legado. Cetere baldaŭ estos Kristnasko, kaj tiam aktualiĝas la donacoj. Kaj inter la libroj oni estas certa, ke oni trovas donacon, kiu interesas al la ricevonto.

Inter esperantistoj same: Ankaŭ por ni longiĝas kaj mallumiĝas la vesperoj. Se ni povas nenion alian fari por Esperanto, ni povas almenaŭ legi ĝian literaturon, — kiu estas vera ĝuo por ni mem, — kaj tiel orientiĝi lingve kaj literature. Iom post iom oni povos mem informi pri legindaj libroj. Kaj ni povas subteni la eldonadon (pri kiu ni ja ĉiuj fieras kaj volonte propagandas), kaj kuraĝigi la aŭtorojn.

Ni publikigas de tempo al tempo malgrandajn literaturaĵojn en nia gazeto, prozon kaj poezion. Kaj per niaj recenzaj kolonoj ni provas informi pri aperintaj libroj, revuoj kaj broŝuroj. Bonvolu elekti! Eluzu la aŭtunon, kaj poste la vintron, por legado kaj studado!

Sciigoj de N.E.L.

Kotizoj por 1965. Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas siajn kotizojn frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj rekte al N.E.L., prefere jam antaŭ Kristnasko.

Anoncoj en Norvega Esperantisto. La kotizenspezoj ne sufiĉas por eldoni dek plenajn 16-paĝajn numerojn de Norvega Esperantisto en la jaro. Sed kelkaj anoncoj estus bona helpo. Ni tial petas la membrojn varbi anoncojn por nia gazeto. Vidu la anoncprezojn sur ĉi tiu paĝo.

U.E.A.-kotizoj 1965. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto «Esperanto» ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1965. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, s.ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118, Oslo-Bryn — poŝtĝirokonto 133.29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la jarlibron kaj la gazeton de U.E.A. La kotizoj por 1965 estas: Membro-Jarlibro kr. 20, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 40, Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 60.

50-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Tokjo, Japanujo, 31. Julio—7. Aŭg. 1965. Aliĝiloj estas riceveblaj de la Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo. Pri la planata skandinavia komuna vojaĝo per aviadilo vidu artikolojn en Norvega

Esperantisto n.roj 9/10 1963 kaj 2/1964. Blankedojn por provizora aliĝo al la vojaĝo estas riceveblaj de la Turisma Servo. Ŝajnas jam ke la vojaĝo efektiviĝos, sed urĝas ekhavi ideon pri la intereso inter la membroj. Tial ĉiuj interesiĝantoj bonvolu informi nin tuj, eĉ se ankoraŭ ne estas certe ke oni definitive aliĝos.

Jaro de Internacia Kunlaborado. 1965 estas proklamita de U.N.O. kiel la «Jaro de Internacia Kunlaborado», kaj U.E.A. decidis partopreni en tiu kampanjo kaj samtempe utiligi la okazon por montri la valoron de Esperanto por tiu celo. I.a. oni kolektos grandamase subskribojn de personoj kaj de organizaĵoj al tutmonda peticio al U.N.O. Blankedojn kun paralela teksto Esp.a kaj norvega ni laŭeble baldaŭ dissendos al kluboj kaj membroj. Ĉiu klubo kaj membro bonvolu jam nun plani sian agadon por la kolektado de subskriboj. Komprenoble ni ĉiuj aktive partoprenos en tiu gravega kampanjo.

Taskotabelo por la kluboj. — *Novembro.* La estraro sendas registritan informon al tiuj membroj, kiuj ne ekzigis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi kotizojn. La Delegito de U.E.A. ekkolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn individuajn membrojn de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkvarono. Okazis 1 estrarkunveno, kaj oni elsendis 1

cirkuleron al la kluboj. La Financa Komisiono energie laboradas. Tom Arbo Høeg reprezentis NEL.n ĉe la Universala Kongreso en Hago, la norvegan registaron reprezentis R. Bugge-Paulsen. Ludvig Anjer partoprenis en la Komitatkunsidoj dum la kongreso. Oni laboris pri la flugkaravano al la kongreso en Tokjo en 1965. L.K.K. de la Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo 19.—22. de Junio 1965 konsistas el John Berggreen, prezid., Alfred Skyberg, Kjell Gustavsen, Astrid Mansrud, C. Støp-Bowitz; ĝi ellaboris provizoran programon de la kongreso, kaj daŭrigas la preparlaborojn. Oni planas la aktivecojn dum la «Jaro de Internacia Kunlaborado» kaj la reaperegon de Esperanto-nytt.

La Liga Estraro.

Nordlanda Esperanto-kongreso en Oslo 1965 (daŭr. de p. 89)

Fine de Junio kutime estas tre avantaĝa tempo rilate al klimato kaj temperaturo en Oslo, tiel ke la partoprenantoj en la kongreso povus ĝui ĉe bonaj kondiĉoj la multajn alogajn vidindaĵojn en la norvega ĉefurbo kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo ĉe la belega Oslo-fjordo.

Ni esperu ke multaj esperantistoj el la nordaj landoj — kaj eble ankaŭ kelkaj el aliaj landoj — trovos la vojon al Oslo por partopreni la gravan aranĝon NORDLANDA ESPERANTOKONGRESO!

Oslo en Septembro 1964

por la Loka Kongresa Komitato

John Berggreen
(prez.)

PROVIZORA PROGRAMO de la Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo 1965

Kongresejo: La Universitato en Oslo.
Adreso:

Nordlanda Esperanto-Kongreso,
Postboks 942, Oslo, Norvegujo.

Kongreskotizo:

Kongresaj aranĝoj n.kr. 18,— kaj Mango ĉe ferma festeno n.kr. 15,—, entute n.kr. 33,—.

Aliĝiloj kaj glumarkoj: Havebla fine de Oktobro.

TAGPROGRAMO:

Sabaton 19/6 posttagmeze: Estrarkunvenoj naciaj. Ekskurso en urba: Urbodomo, Munch-muzeo, Skulptaja parko Vigeland.

Vespere: Interkonatiĝa vespero: Distra programo - danco - bufedo.

Dimanĉon 20/6 antaŭtagmeze:

Jarkunvenoj naciaj.

Posttagmeze: Laborkunsidoj de faksekcioj, ekzemple pri:

«Esperanto inter la junuloj», «Esperanto kaj la blinduloj», «Esperanto en la lernejoj».

Vespere: Festkunveno en la Aŭlo de la Universitato: Artista programo.

Lundon 21/6: Tuttaga ekskurso; per aŭtobuso kaj reen per ŝipo: Holmenkollen kun la skisporta muzeo Vizito en «Sveabu» kaj «Danebu» Bygdøy kun la Vikingaj ŝipoj. Diservo en fostopreĝejo el la 12a jarcento.

Lunĉo en liberaera restoracio. Kon-Tiki-Muzeo kun la floso de Thor Heyerdahl. Polusesplora ŝipo «Fram» (de Roald Amundsen kaj Fridtjof Nansen).

Vespere: Oficiala akcepto (aŭ ev. Teatra Vespero).

Mardon 22/6 antaŭtagmeze: Komuna kunsido: Diskuttemo: Nordlanda

kunlaboro, precipe pri: «Niaj organizaĵoj», «Ekonomiaj problemoj», «Informa laboro».

Posttagmeze: Daŭrigo de la Komuna kunsido (ev. libera tempo por aĉetado).

Vespere: Ferma festo: Filmo — komuna manĝado — danco.

Postkongresaj ekskursoj:

- 1) Vizito per ŝipo en la okcidentaj fjordoj, 6-taga,
- 2) Vagonare trans la montaron al Bergen, 3-taga,
- 3) Aŭtobuse laŭlonge de la suda marbrodo, 4-taga.

John Berggreen (prez.)

5-kronrulado al la Informfondaĵo de N.E.L.

Listo 3:

Ase Gustavsen, Oslo
Bjørn S. Knudsen, Oslo
Magnhild Slaatten, Oslo
Borghild Wærnes, Hamar
Lars Kåre Hunnes, Tr.heim (20,-)
Aagot Sletterød, Oslo
Elvin Eriksen, Oslo

Entute 7.

Belarta Konkurso 1965

La ĉefaj punktoj de la konkursa regularo aperis en la oktobra eldono de la revuo «Esperanto», sur p. 175.

Bonvolu tute speciale atenti pri la nova adreso por sendo de la konkursoj: *s-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio*, kaj pri la pli frua limdato por ricevo de la konkursoj: *la 31-a de marto 1965.*

Emilija Lapenna

Perantino de la Belartaj Konkursoj

RECENZOJ

TRE REKOMENDINDA !

G. E. Maura: «*Duonvoĉe*». Dekoracioj de Reymond Moretti. Kovrilo D. H. Young. STAFETO: Beletraj Kajeroj, 19. — J. Régulo, eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1963. 12 × 19 cm. 180 pĝ. Prezo: 1,50 us. dolaroj aŭ egalvaloro.

Denove nova poemaro de la produktiva eldonejo STAFETO. Ordinaraĵoj homoj ordinare repuŝiĝas pro la nura nomo «poemo», ne komprenante, ke poemo ankaŭ povas esti legebla, eĉ leginda kaj ĝuinda. Mi senriske povas diri, ke tiuj ecoj ne fariĝas reduktitaj pro tio, ke la vesto estas Esperanta. Tute male, kaj tio estas unu el la meritoj de nia poeto: Lia sintasko estas kristale klara. Kvan-kam li eluzas LA POEZIAN terminaron ĝisfine, li ankaŭ povas ŝongii kun la origina vortaro. Ekz.: Disventiĝi, gepatro (en ununombro), pasume (en passant) kaj la mallongigoj: grammatisto, romantisto k. c. Ĉu la klarigo de «lucida» estas tute ĝusta? Mi trovis: klara, serena, lumanta. Por la kompasu direkto «oriento» mi trovis la vorton: Easto. Maurice Lewin en sia *Meteorologia Terminaro* proponis: eosto (por okcidento: vestro). Capp uzas «ost» kaj «vest». Alia rimarkindaĵo estas la ellaso de «da» post tiom: Tiom stacidomoj, tiom vojaĵŝtonoj.

La poemkolekto estas dividita en kvar partoj: Amoro, Amaro, Humuro kaj Dum Iro. La unua parto estas aŭdaca, sed neniam plumpa aŭ truda. La poezio estas altetosa kaj bela. Tial tiuj versoj estas en alta grado ĝuindaj. Io por la poeziemaj, sed en egala mezuro atingebla ankaŭ por pli prozaĵaj, terligitaj personoj. Ĉiu verso kaj poemo entenas mondon da liriko.

La partoj Amaro, Humuro, Dum Iro montras konstante novajn flankojn de la poeto, laŭ progresiva skalo. Epistoloj al la Niceano temas pri la evoluo de la Esperanta poezio de la komenco, tra la «skoloj» pola, hungara kaj skota, ĝis la nuntempo. Spica, sprita kaj suka.

La lasta parto «Dum Iro» estas laŭ enhavo kaj formo kvazaŭ la kvint-esenco de la verko kaj montras mirindajn naturscenaĵojn en la strikta kadro de la metriko.

Mi ne povas ne citi kelkajn versojn:

Kun tago leviĝinte, mi rigardas la vekigantan landon tra l' fenestro; maloftaj bruoj sin aŭdigas: frapo pedanta de la pluvo sur la frondoj, dislokaj krioj de sonoraj kokoj kaj, pase, tintoj de l' preĝej-horloĝo. Fronte al mi, piceoj verde kovras deklivojn de ĉirkaŭaj montoj, krom taĉmento da abioj nigraj, kiuj descendas kojne ĝis la riverbordo, kvazaŭ giganta greg' da praaj uroj forpuŝus de l' trinkej' timemajn brutojn.

Matena vent' frostigas sube l'akvon. Kaj antaŭ tiu ĉi pejzaĝo freŝa, dube vualita de falanta pluvo, medite lasas mi l'okulojn vagi... Kial ne apudestas vi, ho Meva, ĉe la fenestro, apogite al mi kun kap' sur mia ŝultro kaj la brako ameme ĉirkaŭ mia kol'? Ni vidus simile, post plena nokt', la sunon distruu nubojn per radiaj pingloj, ni sentus ankaŭ kuri venton viglan tra niaj haroj, kiel larmoj senamaraj. Ni ĝuus plenĝojon de l'naturu senarte malvolvanta siajn belojn ĉe la unuaj kisoj de la suno... Vane. Sola restas mi, tutsola en la frida mateniĝo; kaj por mildigi tiun elreviĝon, por trompi lasitecon, nun mi skribas al vi ĉi tiujn tristajn pensojn, antaŭ la suno leviĝanta en lazuro.

Jen mi intencis doni kelkajn provde la poemaro. Sed, ho ve! Ĉe la elekto de unu specimeno mi preskaŭ bedaŭras, ke mi ne elektis alian! Do jenaj linioj estu nur kvazaŭ sugesto, ĉar por havi la plenan ĝuon de la libro oni devas legi la tutan libron. Ne pensu ke la donitaj ekzempleroj estas reprezentaj por la poemaro, la libro entenas multe, multe pli!

Mi rekomendas la verkon al ĉiuj Esperantistoj. Eĉ malpli poeziemaj povus trovi ion por si. H. Fridén.

*

Tri kajeroj de Fremdlingva Eldonejo:

Vivu Leninismo, 1963, kun tutpaga bildo de Lenin.

Du radikale antagonismaj politikoj de paca kunekzisto, 1964

La historia sperto de la proleta diktaturo, 1964

Ke tiuj ĉi kajeroj eldoniĝis en Esperanto montras la grandan signifon, kiun oni atribuas al Esperanto kiel universala lingvo kaj perilo de ideoj. Alia menciinda punkto estas la modela lingvaĵo, kiu ĉiam troviĝas en la ĉinaj eldonoj.

La kajeroj eldonitaj en 1964 kompreneble respeguligas la lukton inter la du super-potencoj komunistaj, Sovet-Unio kaj Ĉinujo.

*

Homo kaj Kosmo, populara naturscienca Esperanto-revuo. Eldonisto: Astronomia Observatorio de la Kroatata naturscienca societo, Zagreb, Jugoslavio.

Jen nova kajero de la populara revuo, kvaronjara. — Kelkaj titoloj montras la riĉon de la enhavo: Signaloj de la raciaj estaĵoj el la kosmo? «La mortigaj radioj», Alarmaj signaloj el la ekstertera spaco, Vidindaĵoj en la ĉielo, Ĉu vi scias? Premia konkurso k.t.p. — Bone redaktita, modela

lingvo, entute interesa revuo por juna kaj maljuna.

H. Fr.

*

POLLANDO MODERNA

Pollando 1944—1964, Eld. Polonia, Warszawa, 1964. Redaktoro de la Esperanta eldono: Edmund Fethke. 264 p. + mapo, broŝ. Prezo: 4 int. respond-kuponoj; aĉetebla ĉe Pola Esperanto-Asocio, Nowy Swiat 27, Warszawa.

Jam sur la kovrilo de la libro troviĝas listo pri la ĉefa enhavo: geografio, historio, eksterlanda politiko, industrio, agrikulturo, eksterlanda komerco, sociaj problemoj, klerigado, scienco, literaturo, muziko, teatro, filmo, plastiko, arkitekturo, turismo. Jen ĝuste kion oni deziras scii pri fremda lando. Kaj la enhava tabelo enhavas ankoraŭ pliajn titolojn. La menciitaj fakoj estas dividitaj en mallongajn ĉapitrojn, tiel ke oni facile trovas ĝuste la serĉatan informon, ekz. sub la titolo «Lando kaj homoj» estas ĉapitroj pri geografia situo, fiziografio, hidrografio, flaŭro kaj faŭno, klimato, loĝantaro, administra divido. La libro estas tre riĉe ilustrita, per fotoj, mapoj kaj statistikaj tabeloj, tiuj lastaj plejparte moderne prezentitaj per desegnaĵoj kaj simboloj.

En la enkondukita ĉapitro ni trovas informon tre interesan por norvegoj: «Laŭ sia grandeco ĝi estas la sepa lando en Eŭropo, nome post USSR, Francujo, Hispanujo, Svedujo, Finnlando kaj Norvegujo».

La libro estas tre interesa, facile legebla, — nur la papera kvalito ne estas sufiĉe bona.

Serio da tiaj ĉi libroj kune kun serio pri bildlibroj, kiel la ĵus aperinta libreto pri Nederlando, povos krei grandskalan internacian bibliotekon geografian.

JHR.

LA SALUTPAROLADO

de R. Bugge-Paulsen
ĉe la malfermo de la 49-a U.K.
en Hago 2/8 1964

La norvega registara oficejo por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando nomis min sia reprezentanto ĉe la 49a UK de Esperanto.

En la nomo de tiu sekcio de la reĝa ministerio de Ekstero — kies supera ĉefo, ministro Halvard Lange, cetere daŭre simpatias kun la Esperantomovado — mi kore salutas la kongreson.

Ĉi-jare la 17an de majo Norvegujoj festis la 150-jaran jubileon de sia demokrata konstitucio de la jaro 1814. Tiu konstitucio baziĝas sur la esencaj ideoj de la granda franca revolucio, kies devizo estis: libereco, egaleco kaj frateco — i. a. ĝi malpermesas nobelaron en nia lando.

Tiuj tri vortoj estas la rezulto de 500-jara popolmensa evoluo, jam de la renesanco, kaj estas ĉizitaj en ŝtono. — Nuntempe oni iel iom komprenas la liberecon kaj la fratecon, sed oni neglektas la egalecon.

La esperantistoj laboras por la egaleco, la egalrajto, inter la lingvoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj. Tiu laborado estas idealisma, kaj ni esperu ke la mondo iom post iom komprenos ĝian gravecon por la paca kaj feliĉa kunvivado de la popoloj. Fakte la principo pri lingva egalrajto — kaj kiun sole Esperanto povas ebligi — estas gravega kondiĉo por la ekkresko de vere sincera amikeco inter la diversaj naciecoj. Sur grundo da sencasaj spertoj pri privilegiado, favorado kaj aroganteco unuflanke — kaj pri neglekto, diskriminado kaj eĉ subpremo aliflanke, amikeco ne povas ĝermi.

Mi ne volonte finos antaŭ ol per-

Arnfinn Jensson 50-jara

Licencio pri filologio, asista redaktoro ĉe la telegram-agentejo de la norvega gazeto (eksterlanda sekcio), Arnfinn Jensson, fariĝis 50-jara la 21an de septembro 1964.

Li esperantistiĝis pere de kurso por skoltoj, kiun Arne Arnessen gvidis en Stabekk en 1932, kaj li fariĝis membro de Esperantoklubb for speidere, kiu fondiĝis post la kurso. Du jarojn poste li fondis Esperantoklubon de Stabekk kaj fariĝis ĝia unua prezidanto 1934—35. En 1935—37 li estis ĝen.sekr. de NEL, propagandestro de NEL 1937—47 kaj vicprez. de NEL 1938—47. Li ankaŭ gvidis la Gazetan Servon de NEL 1935—47 kaj la Esperantan Turistan Komisionon.

Dum la milito li prizorgis la oficejon de NEL kaj ĝian libroservon. Aldone al tio li ankaŭ redaktis «Meldinger fra Norsk Esperanto-Forbund», la ciklostilita informilo, kiu aperis anstataŭ Esperantobladet, kiu ja devis ĉesi pro la papersituacio kaj pro la politika situacio. Post la milito li estis redaktoro de Esperantobladet 1946—1947.

En 1945 Jensson iniciatis la fondon de la akcia societo Esperantoforlaget A/S kaj fariĝis ĝia prezid. 1946—48. Li bedaŭrinde devis ekŝiĝi en 1948, ĉar li estis sendota eksterlanden kiel korespondanto de NTB, kaj poste li ne plu aktive partoprenis en la Esperanta movado. En 1951 li fariĝis Komandoro 2 de la NEL-ordeno PRO MERITO.

Korajn kaj sincerajn salutojn al la jubileulo!

LKH

sone komplimenti la urbon Hago pri la Esperanta instrukcio en la telefonkioskoj! Arango vere modela por ĉiuj grandurboj. — Saluton!

50-a Universala
Kongreso de Esperanto

Tokio 31/7 — 7/8 1964

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de ia Japana Akademio

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

KOTIZOJ

La aliĝkotizoj presitaj sur la aliĝiloj disdonitaj dum la 49-a U.K. en Den Haag (blua koloro) estas eraraj kaj sekve nevalidaj. Validas nun la kotizoj presitaj sur flavaj aliĝiloj kaj ili estas la jenaj (ĝis 31/12 64):

	n.gld.	en.
Kongresano	50,—	5000
Edz(in)o de kongresano	25,—	2500
Junulo malpli ol 20-jara	19,—	1900
Universitata Studento		
de 20- ĝis 30-jara	31,—	3100
Blindulo	25,—	2500

UNUA BULTENO

La 8-paĝa Unua Bulteno kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la Landaj Asocioj, ĉefdelegitoj de UEA kaj kongresaj Perantoj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

GLUMARKO

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela dukolora glumarko eldonita okaze de la 50-a Universala Kongreso. Prezo: 0,40 n.gld. (1,60 st.) po folio.

LOGADO EN TOKIO

Definitivaj prezoj de la hoteloj ne estas ankoraŭ konataj. La interesigantoj bonvolu atendi postajn komunikojn kaj la Duan Bultenon, kiun L.K.K. antaŭvidas aperigi en la komenco de januaro 1965.

STATISTIKO

(ĝis 10/9 64): Arg. 4, Aŭstralio 19, Aŭstrujo 7, Bahamaj Ins. 2, Belgujo 7, Braz. 9, Brit. 40, Bulg. 12, Centra Afrika Resp. 1, Ĉeĥosl. 1, Danl. 14, Finn. 4, Franc. 65, Germ. 36, Hindujo 1, Hisp. 6, Hongkongo 2, Hungarujo 7, Irlando 1, Israelo 2, Ital. 17, Japanujo 15, Jug. 10, Kan. 2, Maroko 2, Meks. 1, Monako 2, Ned. 29, Norv. 6, Nov-Zelando 4, Pollando 12, Rumanujo 1, Sved. 34, Svis. 9, Unuiĝ. Araba Resp. 1, Urugv. 3, Usono 26, Venez. 3. — Entute 417 el 38 landoj. (Pasintjare 547 el 27 landoj).

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario


Jubileo

La 3-an de novembro *Ernfrid Malmgren*, estinta prezidanto de UEA, estos 65-jara.

La 16-an de novembro *O. Goldsmith*, estinta ĝenerala sekretario de UEA, estos 75-jara.

Niajn plej korajn gratulojn!


Mi konstatis . . .



ke la Plena Vortaro de Esperanto trovas, ke la landoj ne estas samvaloraj, ĉar ĝi indikas, ke piastro estas «arĝenta monero uzata en Hispanujo, Turkujo kaj orientaj landoj kun tre diversa valoro.»

Hipopotamo

På norsk



Evangeliske radiosendinger på Esperanto

Den nederlandske kristelige radioforening NCRV, en av de sammenlutningene som disponerer sendetid i kringkastingen, sender første mandag i hver måned et program på Esperanto. Sendingene går over Hilversum på 298 meter.

Esperanto i ideologisk debatt

Folkerepublikken Chinas regjering utgir nå politiske artikler fra partiavisene i særutgaver på Esperanto. Artiklene blir trykt som brosjyrer og blir distribuert verden over med luftpost. De siste behandler «Opprinnelsen til og utviklingen av uoverensstemmelsene mellom lederne i KPSU og oss» og «Sannheten om KPSU-ledernes og Indias allianse mot China».

Esperantister verden over har lenge for en beskjeden kontingent kunnet abonnere på tidsskriftet «El popola Ĉinio» («Fra Folke-China»), som i tekst og bilder forteller om China under det nåværende system.

Moskva tar opp igjen Esperanto

Etter at det i 28 år har vært stille om det internasjonale språket i Sovjet, er det nå utgitt en større samling «Sanger av Sovjet-komponister» på Esperanto. Boken inneholder mest sanger om fred og fedrelandskjærlighet i internasjonal gjendiktning. — Blant de diktere som er kommet med i samlingen, finner en også Jevtusjenko, som har fått et kjent navn også utenfor Sovjet.

Inntil i fjor høst, da en russisk delegasjon fikk anledning til å reise til Verdenskongressen for Esperanto i Bulgaria, har den offisielle holdning

til Esperanto i Sovjet nærmest vært negativ. Siden oversettelser av Lenin og Stalin ble utgitt i trettiårene, har det bare kommet ut noen mindre lærebøker i Esperanto.

Esperanto i skolene i 32 land

En omfattende undersøkelse som er foretatt av Universala Esperanto-Asocio's forskningsenter i London, viser at det i skoleåret 1962-63 var 16 272 skoleelever i 563 skoler i 32 land som fikk undervisning i Esperanto på skolen. Statistikken gjør ikke krav på å være fullstendig, men gir allikevel et inntrykk av stillingen for Esperanto i skolene. Tallene viser framgang fra foregående skoleår, da det var registrert 13 137 elever og 356 skoler.

Den økende interesse for Esperanto i skolekretser kom også frem på den første internasjonale kongress for «Esperanto i skolen», som ble holdt i Beograd i fjor høst etter initiativ av det jugoslaviske UNESCO-utvalg, og hvor 214 professorer og lærere fra 20 land drøftet pedagogiske spørsmål i forbindelse med innføring av Esperanto i skolen.

Du konataj esperantistoj mortis

La 24-an de aŭgusto mortis nia greka samideano, doktoro *Anakreon Stamatiadis*, kiu naskiĝis 1868. Li estis membro de la Akademio de Esperanto kaj Honora Membro de UEA. Li ĉestis la Unuan Universalan Kongreson en Boulogne-sur-Mer. Li verkis almenaŭ 15 librojn pri kaj en Esp.-o.

La 21-an de julio mortis nia brazila samideano *Luis da Costa Porto Carreiro Neto*, en la aĝo de 70 jaroj. Li estis eksa membro de la Akademio de Esperanto. Li estis konata precipe pro siaj bonegaj tradukoj, precipe de spiritismaj verkoj.



17-a Internacia Fervojista Esperanto Kongreso

Ni mencias el la provizora programo por la 17a IFEF-kongreso:

Vendrede 21/5: Malfermo de la kongresejo, FESTIVITETEN.

Sabate 22/5:
20.00: Interkonatiga vespero

Dimanĉe 23/5:
8.30: En la Katedralo: Protestanta diservo, pastoro H. A. Rosbach
8.30: En St. Torfinn Preĝejo: Katolika diservo, paroĥestro Duin.
10.00: Solena malfermo de la kongreso en TEATRET.
15.30: Eventuala inaŭguro de Esperantostrato.
17.00: Vizito en Norvega Fervojmuzeo
20.00: Komuna Vespermanĝado

Lunde 24/5:
9.00: Unua laborkunsido
12.00: Vizito al la fervoja riparejo kaj al Hamar ferfandejo.
12.00: Ekskurso por la virinoj.
13.30: Lunĉo ĉe la urbestro por la IFEF-estraro kaj delegitoj.
15.45: Trajnekskurso al Elverum
16.30: Alveno al Elverum, inaŭguro de Esperantostrato. Vizito en la Glåmdalmuzeo (popolmuzeo) kaj en la muzeo por arbar-kultivado.
Komuna vespermanĝado en la restoracio de Glåmdalmuzeo.
22.00: Kromtrajno por la kongresanoj al Hamar.

Marde 25/5:

9.00: Dua laborkunsido
12.00: Kunveno de la fakprelega komitato.
15.30: Kunv. de Terminara Komitato
20.00: Kultura kaj teatra vespero en TEATRET.

Merkrede 26/5:

9.00: Boatekskurso sur lago Mjøsa al la najbarurbo Gjøvik.
16.00: Fakprelego.
19.00: Bankedo kaj kongresbalo.

Ĵaŭde 27/5:

10.00: Vizito al la popolmuzeo por la regiono Hedemarken, kaj al la mezepoka katedralruino.
12.30: Koncerto de la Fervojista Blovorĥestro en la muzeo.
16.00: Fakprelego 2, temo: La fervojista fakmovado en Norvegujo. Turista kaj fervojfaka filmprezentado.
20.00: Serioza koncerto en Hamar Katedralo.
20.00: Junulara vespero

Vendrede 28/5:

Tuttaga ekskurso al Lillehammer per aŭtobuskaravano. Vizito en Maihaŭgen popolmuzeo. Komunaj tagkaj vespermanĝoj en Lillehammer. — La prezidanto deklaras la 17an IFEF-kongreson fermita antaŭ ol la reventurado al Hamar.

Internacia Radio-Studio en Madagaskaro

Kiel anoncite lastatempe en diversaj Esperanto-revuoj, la Ministerio por Informado kaj Turismo de Madagaskaro, konsiderante la rapidan evoluigon de la lando post ties sendependeco, deziras i.a. pli konatigi la insulon eksterlanden. La Ministro vizitinta eŭropajn landojn kaj Amerikon, planas je kreo de Televido post iomaj jaroj.

Unualoke, oni decidis ekfunkciigi internacian Radio-stacion komence de la jaro 1965. Diversaj naciaj lingvoj do estos uzataj. Niascie, tia radio estas kreita en Kongolando. Jen bona okazo ne nur por la lokaj asocioj tuje agi, sed por ni ĉiuj anoj de la Esperantismo. Kvankam la afero okazas en nia lando, ĝi koncernas la tutan movadon. Mi memorigas tie-ĉi, kion samideanino *Emilija Lapenna* (ĉe Esperanto-Fako de Radio-Zagreb) en sia artikolo aperita en Esperanto de junio No. 691, diris:

«Se oni komparas la grandegan nombron de Radio-Stacioj en la mondo kaj la malgrandan programon de tiuj elsendantaj esperantlingvan programon, altrudiĝas la konstato ke tiukampe la movado nesufiĉe faris kaj devus tre streĉi siajn atenton kaj forton por atingi pli, ĉar se ekzistas agadkampo kie la Internacia Lingvo estas pli bezonata tiu estas la radiofonio kiu per pli vastskala apliko de la internacia lingvo malfermus grandegajn eblecojn por la internacia kontakto kultura kaj ĉiuspeca.»

Do amase aŭ unuope ni varme petas vin adresi leterojn al jenaj adresoj, ĉu esperantlingve, ĉu francilingve, aŭ almenaŭ al unu el ili.

- 1) *Al la Direktoro de la Radio.*
à Monsieur le Directeur de la Radiodiffusion Malgache
Tananarive/République Malgache.
- 2) *Al la ministro por informado kaj turismo.*
à Son Exel. Monsieur le Ministre de l'Information et du Tourisme de Madagascar,
Tananarive/République Malgache.

Por ke viaj leteroj atingu la adresitojn ĝustatempe ni petas vin, aerpoŝte ilin sendi.

Eugène Raveloson, Tananarive

Muziko kaj Esperanto

Smitinda kunlaboro

Asocioj de Polaj Komponistoj, Regiona Rondo en Vroclavo organizas de 25.—29. de novembro 1964 tutpolandan aranĝon sub la nomo «III-a Vroclava Festivalo de Moderna Muziko Pola», dum kiu oni prezentos publike la plej novajn kaj modernajn simfoniajn, ĉambrajn kaj ĉambrohoran koncertojn, baleton «Pinokio», opereton «Diabla Sabato», koncerton de eksperimenta muziko, «Noktan koncerton — muziko de pola rennesanco» k. a.

Por vaste propagandi — ne nur en la propra lando — la plej novajn atingajojn sur kampo de la pola moderna muziko, Asocio de Polaj Komponistoj, Regiona Rondo en Vroclavo decidis eldoni dulingvan festivalan prospekton (poste ankaŭ same pli detalan programon) en la lingvoj pola kaj Esperanto kaj konekse kun tio ĝi turnis sin al la Pola Esperanto Asocio, Filio en Vroclavo por helpo vaste propagandi polan modernan muzikon pere de Esperanto, laŭ la slogano: «Du lingvoj internaciaj: Muziko kaj Esperanto».

Por subteni morale la organizantojn en ilia poresperanta kunlaboro kaj por pruvi al la plimulto de eminentaj komponistoj, al gravaj teoriuloj kaj al aliaj fakuloj pri muziko ĝenerale la praktikan utilecon de Esperanto, estas tre dezirinde, ke la organizantoj ricevu kiel eble plej multe da diversaj salutoj kaj bondeziroj okaze de Festivalo, demandoj pri pola muziko, skoloj, moderna tekniko muzika ktp., el la tuta mondo. Organizantoj garians dankan respondon. Skribu do amase al: Asocio de Polaj Komponistoj, Regiona Rondo en Vroclavo, Rynek Ratusz 26, ĉambro 31, VROCLAVO, Pollando.

ARNT SCHØNING:

Nordlando, la fabela lando

Nordlando! La nura nomo pensigas pri aventuroj kaj fabeloj! Kiel malsovaĝaj estas huldro kaj nikso kompare al la draŭgo de la Nordlandanoj! — La draŭgo en sia duona boato; la senerara kaj terura anoncanto de la morto, la marmonstro, kiu furiozas ankaŭ surtere, malsupre ĉe la strando kaj renversas remilojn kaj ĉerpilojn en la boato de la fiŝisto, aŭgure de venontaj malfeliĉoj. Hu! Eĉ ne la norda vento povas tremigi en tia grado kiel la vido de ĉio draŭgturnita dum la nokto, kiam la maro tordiĝadas tie ekstere, ŝtormvipata kaj verda, sin ĵetegante kontraŭ la eksteraj ŝeroj en alta vibranta ŝaŭmo, kiu neniam sinkas ĉar ondo sekvas ondon en eterna kaj rapida lavado.

Ne strange, ke la fabeloj kaj mitoj estas agorditaj en pli forta, pli sorĉa tono tie ol aliloke. La popola fantazio ĉiam alprenas kolorojn de la naturo mem kaj ĉerpas nutron el ĝi. Vojaĝu laŭ la nordlanda kusto — la bluantaj pintoj ĉiuj prenis siajn nomojn el la nordlanda popolfantazio. Jen «La Ĉevalisto» (Hestmannen) preter vi rajdas, kaj «Ruĝinsula Leono» (Rødgøløven) kuŝas gardante sian trezoron — kaj

«Ĉe Alstahaug bieno troviĝas videblaj Sep Fratinoj, plektantaj siajn harplektojn en neĝo, sep virinoj, kaj ĉiuj en blanko —»

Ateston pri la superstiĉo, kiu timas nomi la objektojn per iliaj ĝustaj nomoj, ni trovas en la nomo «Landegode», mirinda montformiĝo tuj norde de Bodø. Kiam la aŭtunaj kaj vintraj ŝtormoj furiozas tie ekstere, tiam la homoj en sia timo baptis la insulon «Bona Lando» — Landegode — por ke la malbonaj spiritoj ne tiel

koleru. En unu el siaj formiĝoj la monto similas al virinaĉo, antaŭen kliniĝanta kaj marŝanta. Iam antaŭ tre longe ŝi estis survoje al «Vågekallen» — La Vågeviraĉo — al kiu ŝi edziniĝu, - li staras peza kaj sinistra, kovante sur la alia bordo de Vestfjordo — sed la suno leviĝis antaŭ ol la virinaĉo, sukcesis transveni, kaj jen ŝi staras en firma kaj neŝancelbla sopiro, rigardante transen al sia amato.

Stormo kaj silento, suno kaj malumo abrupte alternas en Nordlando. La somero superlavangas la landon sen printempo kaj averto, la violoj estas elsorĉataj kvazaŭ subitaj ridetoj, la herbejoj verdiĝas dum unu tag-nokto, pli luma ol tago mem. Ĉi tie ne estas malrapida kaj longe pripensita evoluo de la naturfenomenoj. Ĉiuj koloroj de la somero briladas kontraŭ neĝaj regionoj tute proksimaj.

Ĉi tie ni kultas kaj adoras la sunon kiel nenie alie en nia lando. La suno regas dum monatoj kiam nokto ne estas, kaj ĝi forlasas nin tiel longe, ke la tagoj ŝajnas malaperintaj por eterne. La suno kreas la akrajn kontrastojn, kiuj alternas super la lando. La laboro de la suno ĉi-norde ne estas la kutima kaj bela leviĝo kaj malleviĝo. Ĝia disko ardas dum la somero tra la tuta tagnokto. Pinto ĉe pinto leviĝas en la somera nokto kiel bluantaj kupoloj el la maro, kiu lante ŝveladas kvazaŭ brusto spiranta. Kaj en tiuj silentaj noktoj de lumo estas kvazaŭ ni restadas en sankta lando, kie ĉiuj pintoj estas turoj kaj minaretoj.

Grandiozo kaj majesto regas en la regno de Nordlandanoj. Neniu ruĝiĝanta tenereco ripozas super la lando. Tiuj montblokoj en suno kaj spito

kontraŭ la ĉielo vekas al vivo en niaj koroj la saman respekton miron, kiun ni povas senti rilate al la plej malnovaj tempoj, kiam tero estis kreata, kiam la spirito de Dio ŝvebis super la akvoj . . . Kaj kie en la vasta mondo la silento povas esti sentata kiel potence kiel en nordlandaj someraj noktoj! La molanaso silentas inter la ŝeroj, la bluo de la monto foreksplodas en oron kaj violkoloron, kaj la maro ripozas sonĝante pri siaj propraj aferoj . . .

Kaj kiam aŭtuno proksimiĝas, mi nenie vidis tiel karesan krepuskon super la montoj kiel tie ĉi, nenie alie vidis kiel la montoj, la bluaj montoj transglitas en ankoraŭ pli bluan ĉielon. En aman sinon tiu krepuska ĉielo tiras al si ĉiujn montojn. Dum kelkaj senzonoj sekundoj la tuta metamorfozo estas plenumita kaj finita . . .

Ho, mi scias pri land'
longe for en la nord'
kun lumanta mar-strand'
inter monto kaj fjord'.
Tien vagas memor',
tie fiksas sin kor'
per plej fajna ruband'
∴: Mi memoras, mi memoras,
ho, memoras mi pri tiu land'. ∴:
(Blhx)

Tradukis Henry Fridén

Huldro kaj nikso — fabelaj estaĵoj
Draŭgo — marmonstro (fabela besto)
kusto — marbordo
sinistra — malbonaŭgura, minaca,
malhela
lanta — malrapida

Korespondu!

22-jara desegn-instruisto dez. kor. kun geamikoj norvegaj pri diversaj temoj: naciaj kutimoj kaj vivmanieroj, religioj, artoj, vojaĝoj. — Ernesto Cordero, Tréveris 2651, Buenos Aires, Argentino.

Ni prezentas tradukon de poemo de Nils Collett Vogt okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo 24. sept. 1964.

Nils Collett Vogt:
(1864—1937)

La poploj sur «Eidsvolds Plado»

*Ja vidis mi, amik', je renkontiĝo
la pikan, sekan fiksrigardone vian,
rideton moka kaj venene flaman.
Mi kion pensas? — Ni ja antaŭ longe
je tag' en maj' sur «Karl Johan»
dandiris;*

*la poploj, ekflorintaj ĵus, etendis
kun brilo kvazaŭ de metal' sin supren
— la distingitaj kaj solenaj poploj —
trinkonte kvazaŭ sunon el la fontoj.*

*Ĉu vi memoras? Ambaŭ tuj eksentis
kun sku', ke ni iliaj fratoj estas.
Jen alta celo, tamen atingota.
Elteran serenecon ni akiru,
komprenu ĉion teran, ni, mirantaj,
naive je komenc' de l' viv' starantaj.*

*Junulsingenaĵaj, revsilentaĵaj, disen
ni iris por feliĉon nian ĝui.*

*La voj' de vi irita ne ŝvitigis.
Jam longe sidis vi, en ŝtatofico,
korekta, digna, patro de l' popolo.
Sed mian iron ĉiam mi daŭrigis.
Alaŭdo, nevidebla, kantis dum mi
trairis birdlibere primaveron,
sed akre ventis, pluvis dum aŭtuno.*

*Jen grizaj haroj kaj pied-doloro,
min tamen vokas poploj de l' junaĝo,
suprencelantaj.*

Do, kial ĉi ridet' je renkontiĝo?

Trad. Tr. R.

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo.

4/6. La prez. legis dankon de Tharald Dybing pro la donaco je lia 80-jara naskiĝtago.

Okaze de la 150-jara datreveno de la norvega konstitucio Tom Arbo Høeg prelegis: «Pri la origino de la Norvega Konstitucio». T. A. Høeg precipe pritraktis la konstitucion el juraj vidpunktoj kaj klarigis pri la evoluo de la ideoj de libereco de Rousseau, Montesquieu, la franca revolucio ktp. laŭ kiuj la popolo mem devas havi la potencon — popolsuverenecon. La finis per la vortoj «Nia konstitucia leĝo estas vivanta leĝo.» — La prez. dankis al Tom Arbo Høeg pro la tre interesa prelego kiu estis prezentata en eminenta formo kaj admiringe klara lingvo, kaj la ĉeestantoj montris ke ili altis taksis la bonan prelegon per forta aplaŭdo. — Por ilustrati la prelegon Tom Arbo Høeg estis prezentanta Bildon en 2 scenoj: «Konstitucio kaj Storting». Lektoro Ivar Aars ellaboris la bildojn pro memorfesto en Aars & Voss lernejo, kaj C. Støp-Bowitz tradukis ilin al Esperanto. En la unua sceno — 6 membroj de la konstitucia komisiono en Eidsvold 1814 diskutas la formuladon de la Konstitucio — partoprenis J. Berggreen, C. Støp-Bowitz, Rolf Bugge-Paulsen, Einar Gustavsen, John Selbekk kaj Otto Koren. En la dua sceno — 4 membroj de la «Storting 1964» interparolas kun du el la Eidsvolluloj en la Stortingkonstruaĵo 1964 — partoprenis C. Støp-Bowitz, R. Bugge-Paulsen, John Selbekk, Kirsten Ek, John Berggreen kaj Otto Koren.

La kantoj «Meze en fera tempo» kaj «La Espero» estis kantataj, akompanataj per piano de Aslaug Refsing.

La lasta programero estis Diven-

konkurso aranĝata de la Junulara Grupo gvidata de Ellen Tangen.

C. Støp-Bowitz diris memorigajn vortojn okaze de la forpaso de profesoro Hideo Yagi, la prezidanto de UEA, kaj la membroj honoris lian memoron per mallonga silento.

11/6. Kunveno en la somerdomo de la familio Støp-Bowitz, Oksval, Nesodden. — La prez. John Berggreen malfermis la kunvenon kaj dankis al gesinjoroj Støp-Bowitz ĉar ili ankaŭ tiun ĉi jaron afable invitis la klubon havi la lastan kunvenon antaŭ la somerferio en sia somerdomo. — Oni kantis la Kluban Marŝon kaj «Mariston logas vasta mar'», akompanataj sur akordiono de Støp-Bowitz. — La sekretario legis la raporton pri la klubkunveno 4/6, kiu estis aprobata.

C. Støp-Bowitz disdonis diplomojn al jenaj kiuj plenumis ekzamenon: Gunleik Bergrud, Olav Ekkeren, Inger Gjertsen, Solveig Hauger, Aslaug Refsing, Bjarne Sorknes kaj al la infanoj de la kurso de Astrid Mansrud en Bekkelaget skole, kiuj faris ekzamenon: Kjell Andresen, Petter Bogen, Ørnulf Daler, Einar Kaspersen, Marianne Mansrud, Jan Stensrud, Rolf Strøm, Stein Undheim, Sverre Undheim, Kjell Aaser. Ankaŭ ricevis diplomojn jenaj du knaboj kiuj partoprenis la kurson sed ne faris ekzamenon: Ole Dencker kaj Odd Erik Olafsen. C. Støp-Bowitz dankis al ili por ilia intereso kaj admonis ilin daŭrigi la studadon de la internacia lingvo.

Post la kafopaŭzo estis ludoj gvidataj de Brynhild Østmo, kaj oni dancis laŭ muziko de Carl kaj Harald Støp-Bowitz.

La Urso, Sarpsborg,

kunvenis la 24-an de septembro. En la serio «La nova libro» oni prezentis la membiografion de Edmond Privat, «Aventuroj de pioniro».

Vespere estis tempo por amuzajoj, prelegoj diskutoj, dancado, kantado, prezentado de filmo ktp. Ni estis gaja rondo kaj neniu timis interparoli, ĉar ĉiu helpis unu la alian. Tia ferio en la sincere amika atmosfero estas neforgesebla.

Provu, vi certe samopinionos.

G.J.P.

Ni diskutis novan publikan kultur-programon, kiun la klubo proponos al la Urba Biblioteko, — kaj pri kiu interesiĝas la Biblioteko.

Kiel kutime okazis ellotado per bildkartoj.

Fine J. H. Rosbach montris siajn lumbildojn el somera vojaĝo tra Germanujo.

La Internaciaj Feriaj Kursoj en Helsingør

Somere mi denove partoprenis la esperantan kurson en Helsingør, ĉar mi scias ke tie la ferio devas esti sukcesa, eĉ se la vetero estas malbela. Estas ĉiam interesa semajno. — La Internacia Altlernejo situas en bela parko kie ni ĝuis promenojn kaj ankaŭ havis lecionojn se la vetero estis sufiĉe bona.

Kiel ĉiujare la gvidanto, s.ro Friis, afable bonvenigis nin kiam ni venis al la lernejo. Proks. cent diverslandaj geamikoj partoprenis, kaj ni havis bonan eblecon praktiki kaj plulerni la internacian lingvon.

La instruado okazis antaŭtagmeze. Ni povis elekti inter kvar diversaj kursoj. Ĉi tiun fojon mi elektis la perfektigan kurson, kiun gvidis s.ro Moravec. Li estas lerta instruisto kaj donis al ni ege interesajn lecionojn kiujn mi ne volis malhavi. Antaŭe mi ĉeestis aliajn kursojn, kaj mi povas rekomendi ĉiujn. La spertaj instruistoj vere sciis paroligi nin; estis kaj instrue kaj amuze.

Posttagmeze estis aranĝitaj komunaj ekskursoj al diversaj vidindaj lokoj, kaj ni havis la plezuron viziti Helsingborg, kie ŝvedaj gesamideanoj nin akceptis kaj gvidis.

Korespondu!

S.ro Sergej Storĉevoj, sovetukrajna elektro-inĝeniero, p.o.kesto 97, *Jitomir*, Sovet-Unio, deziras interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, F.D.C. kaj alumetetiketojn kun gekolektantoj el la tuta mondo.

*

Ĉeĥa oficesto dez. kor. kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn. S.ro František Šoulavý, Ulice 5, Května 39, *Praha 4, Pankrác*, Ĉeĥoslovakio.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg: - Uzu tiun adreson, kiam temas pri urgaj sendaĵoj.

Telefona: 54 727